

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK


Exp- 705862-B

Alexandre DUMAS


1803-1870

TRI RAKONTOJ

El Impresoj de Vojagoj (1836)

Tradukitaj de S^{ro} E. DELIGNY,  O. I.

Profesoro diplomita de Internacia Instituto de Esperanto



SAINT-OMER

Imprimerie de L'INDÉPENDANT

1932

Al la biblioteko de Internacia
Hejmo Esperantista en Aprenmont

10^{an} de Majo 1932

J. Deliquis

705.862 - B W




Alexandre DUMAS

1803-1870

TRI RAKONTOJ

El Impresoj de Vojagoj (1836)

Tradukitaj de S^{ro} E. DELIGNY,  O. I.

Profesoro diplomita de Internacia Instituto de Esperanto



SAINT-OMER

Imprimerie de L'INDÉPENDANT

1932

ÖNB



+Z103829507

705862-0

ALEXANDRE DUMAS

1803-1870

TRI RAKONTOL

El impresor de vejez y juventud

Traducción de Sr. E. DELIGNY, 1891.

Traducción revisada de Sr. E. DELIGNY, 1891.



IMPRESOR DE VEJEZ Y JUVENTUD

Imprenta de Sr. E. DELIGNY

1891

LA TIMEMA AZENO

Ni ne haltis en Brunnen, kiu prezentas nenion rimarkindan ; ni nur demandis homon, kiu fumis, sidante sur la benko de la lasta domo, ĉu ni sekvas la ĝustan vojon al Ŝvitz. Tiu, al kiu ni faris tiun demandon, respondis jese kaj, por pli granda certeco, li montris al ni, je tricent paŝoj antaŭ ni, landanon kaj lian azenon, kiuj nin antaŭiris en la vojo de ni sekvota, kaj kiuj nin antaŭiros tiel ĝis Ibak ; cetere, oni ne povas erari, ĉar la vojo de Ŝvitz al Brunnen estas veturebla.

Trankviligitaj de tiu klarigo, ni estis perdintaj niajn du gvidistojn malantaŭ kurbiĝo de la vojo, kaj ni jam ne plu pensis pri ili, kiam alveninte al la loko, kie ili malaperis, ni vidis la kvarpiedulon, kiu revenis galopege al Brunnen, kaj kiu, sendube por anonci sian alvenon, donis al sia voĉo la plej altan laŭtecon, kiun ĝi povis atingi. Post ĝi, sed perdante tiom da spaco, kiom Kuriacio vundita, de Horacio sana kaj senvunda, venis la landano, kiu kurante provis la plej persvadan elokventecon por haltigi la forkuranton. Ĉar la lingvo, en kiu tiu bravulo petegis sian azenon, estis mia gepatra lingvo, mi estis tiel multe kortuŝita de lia parolado, kiel malmute estis la stultega besto, kaj, je la momento en

aiŭ "jam ne"
aiŭ "ne plu"

kiu ĝi pasis apud mi, mi lerte kaptis la ŝnurligilon post ĝi trenatan ; sed ĝi ne kredis sin haltigita, kaj daŭrigis tiri siaflanke. Ĉar mi ne volis esti venkita de azeno, mi obstinis kaj tiris miaflanke ; resume, mi ne povus diri, kiu estus venkinta, se mia servisto Francisko ne estus min helpinta, pluvigante sur la postajon de mia kontraŭulo pluvegon da batoj de sia vojaĝbastono. La argumento estis decidiga. La azeno tuj cedis. En tiu momento, la landano alvenis kaj mi redonis al li la malliberulon.

Kapiton

La bonulo ŝvitegis ; tial ni kredis, ke li daŭrigos sur sian beston la komencitan punkorekton ; sed, je nia granda miro, li ĝin alparolis kun afabla akcento, kiu ŝajnis al mi tiel strange harmonia kun la cirkonstanco, ke mi ne povis ne montri al li mian miron pri lia indulgemo kaj ke mi diris al li malkaŝe, ke mi kredas, ke li tute malbonigos la karakteron de sia besto se li ĝin kuraĝigas por tiaj kapricoj.

— « Ha, li respondis al mi, tio ne estas kaprico ; sed nur ĝi timas, tiu kompatinda Peĉjo.

— Kion ĝi timas ?

— Ĝi timas fajron, kiun infanoj ekbruligis sur la vojo.

— Nu, pripensu, mi daŭrigis, malbonegan mankon ĝi havas, Sinjoro Peĉjo, se ĝi timas fajron.

— Kion vi volas, respondis la bonulo kun sama indulgo, ĝi ne povas kontraŭstari, kompatinda besto.

— Sed, se vi ĝin rajdus, mia bravulo, kiam tia timo ĝin kaptas, se vi ne estas pli bona rajdisto ol mi supozas, ĉu vi scias, ke ĝi rompus al vi la kolon ?

— Ho, jes ja, Sinjoro, respondis la landano kun konvinka gesto, tio ne

ebly/ estas dubinda, tial mi ĝin neniam rajdas.

— Tiam ĝi estas por vi tre agrabla besto.

viro — Nu, kian vi ĝin vidas, daŭrigis la homo, ĝi estis la besto la plej obeema, la plej hardita kontraŭ la laceco, kaj la plej kuraĝa en la distrikto ; ĝi ne havis sian samulon. *egalulon.*

— Via cedemo por ĝi certe ĝin malbonigis.

— Ho, ne, Sinjoro, akcidento ĝin trafis.

— Antaŭen do, Peĉjo, mi daŭrigis, puŝante la azenon, kiu denove estis haltinta.

— Atendu... sed ĝi ne volas trapasi akvon.

— Kiel ? Ĉu ĝi akvon ankaŭ timas ?

— Jes, ĝi timas.

— Ĝi do ĉion timas ?

— Ĝi estas tre timema, vere. - Nu, iru, Peĉjo. »

Ni alvenis je loko, kie rivereto, larĝa dekon da futoj, trabaris la vojon, kaj Peĉjo, kiu ŝajnis havi abomenon kontraŭ akvo, estis restinta sur la bordo, kun la kvar piedoj enfiksitaj en la tero, kaj tute rifuzis fari pluan paŝon. Ĝia decido estis videbla ; la landano sensukcese tiris, Peĉjo kontraŭmetis nevenkeblan inertecan forton. Mi min alligis al la ŝnuro kaj tiris miaflanke ; sed Peĉjo pli forte alkroĉis sin, sin firmigante sur siaj malantaŭaj piedoj. Tiam Francisko ĝin puŝis je la postaĵo, sed tio ne malhelpis, ke Peĉjo, malgraŭ la kunigo de niaj klopodoj, staris en la plej perfekta senmoveco. Fine, ne volante hontigi pri malsukceso, mi tiris tiel forte, ke subite la ŝnuro rompiĝis. Tiu

akcidento havis sur la diversaj personoj efikon saman en siaj rezultatoj, sed tre varian en siaj detaloj : la landano falis, kun la postaĵo en la akvon ; mi iris dorsdirekten sterniĝi je dek paŝoj en la pulvon ; kaj Francisko, perdante apogpunkton pro la kvaronturniĝo, kiun faris surprize Peĉjo sin sentante libera, falis kun la nazo kaj ambaŭ manoj en la ŝlimon.

— « Mi estis certa, ke ĝi ne trapasus, diris trankvile la bonulo, tordante la fundon de sia duonpantalono.

— Sed, vere, rinoceraĉo estas via Peĉjo, mi respondis, min senpulvigante.

— Diavolo di sommaro, murmuris Francisko, suprenirante en la fluon, por lavi la vizaĝon en loko, kie la akvo ne estis malpura.

— Mi vin vere dankas, diris la bonulo, pro la peno, kiun vi prenis por mi, mia bona sinjoro.

— Nedankinde, sed mi bedaŭras, ke ĝi ne havis pli bonan rezultaton.

— Kion vi volas ? Kiam oni faris, kion oni povas, oni nenion devas bedaŭri.

— Nu, sed, kiamanere ni solvos la aferon ?

— Mi kurbiros.

— Kiel ? Vi cedos al Peĉjo ?

— Estas necese, ĉar ĝi ne volas cedi al ni.

— Ho, ne, mi diris, tio ne finiĝos tiel ; eĉ se mi devus porti Peĉjon sur mia dorso, Peĉjo transiros.

— Ho, ĝi estas multpeza, diris la homo, skuante la kapon.

— Prenu ĝin per la brido ; mi havas ideon. »

La landano retrairis la rivereton

kaj kaptis per la ŝnurligilo Peĉjon, kiu, trankvile haltinte, maĉis kardon.

— « Bone, mi daŭrigis, nun, alkonduku ĝin kiel eble plej proksime de la fluo.

— Ĉu ĝi estas bone tie ?

— Perfekte. Ĉu vi finis vin purigi, Francisko ?

— Jes, via Moŝto.

— Donu al mi vian bastonon kaj iru al la kapo de Peĉjo.

Francisko donis al mi la petitan objekton kaj faris la ordonitan movon ; pri la landano, li ameme karesis la azenon.

3 Mi uzis tiun momenton por min lo- kigi malantaŭ la azeno, kaj dum ĝi respondis al la amikaĵoj de sia mas- tro, mi pasis la du montbastonojn in- ter ĝiaj kruroj. Francisko tuj komprenis mian intencon, sin turnis kiel portisto, kiu sin preparas por levi hom- portilon, kaj prenis ambaŭ bastonojn je unu fino, dum mi ilin tenis je la alia ; je la vorto « levu », Peĉjo for- lasis la grundon kaj je la ordono « An- taŭen marŝu », ĝi triumfe ekiris, ŝaj- nante preskaŭ portlito, kies portistoj ni estis.

Ĉu la noveco de la rimedo ĝin sen- pensigis, ĉu ĝi trovis tiun vojaĝma- nieron je sia ŝato, ĉu fine ĝi estis kon- vinkita pri la pliboneco de niaj dina- mikaj rimedoj, Peĉjo neniel rezistis kaj ni ĝin demetis tutsanan sur la alia bordo.

Severa admono. Kion vi pensas pri tio, mia kompatinda Peĉjo ?

— Kaj nun, mi diris al la landano, vi rakontu al mi la akcidenton, kiun suferis via azeno kaj de kie devenas la timo, kiun ĝi havas je akvo kaj fajro :

al
la

tion almenaŭ vi ŝuldas al mi, pro la komplezo, kiun al vi mi faris.

— Ha, Sinjoro, li respondis, metante la manon sur la kolon de la besto, du jaroj estos pasintaj dum la venonta monato de Novembro, kiam tio okazis ; estis jam dika neĝo en la monto ; kaj iun vesperon, kiam mi estis reveninta kiel hodiaŭ de Brunnen kun Peĉjo (en tiu tempo la kompatinda besto nenion timis) kaj ni varmiĝis, mia filo (mia filo tiam ne ankoraŭ estis mortinta), mia bofilino, Fidelo, kaj mi ; ĉirkatu bona fajro.

— Pardonu, mi intermetis, sed kiam mi ekaŭdas rakonton, mi ŝatas koni la aktorojn netrudiĝe ; kiu estis Fidelo ?

— Krom respekto al vi, estas mia hundo, belega grifo ; mirinda besto, sciu.

— Bone, mia amiko, nun mi aŭskultas.

— Ni do varmiĝis, aŭskultante la venton sibli en la abioj, kiam oni ekfrapis ĉe la pordo ; mi kuris por malfermi ; estis du junuloj el Parizo, kiuj foriris de Sankta Anna sen gvidisto kaj kiuj erariĝis en la monto ; ili estis rigidaj pro malvarmo ; mi ilin alproksimigis ĉe la fajro kaj, dum ili degeliĝis, Marianino preparis femuron de ĉamo. Ili estis gajvivuloj, duonmortintaj, sed gajaj kaj petolaj tamen, fine veraj Francoj. Tio estis ilin savinta, nome ke ili havis kun si ĉion necesan por fari fajron ; tiel du aŭ trifoje ili estis ekbruligintaj branĉojn, revarmiĝintaj kaj reprenintaj denove la vojon ; tiamaniere, ke, sinsekve marŝinte, malvarmiĝinte, revarmiĝinte, repreninte la vojon, ili fine atingis la domon. Post la vespermanĝo, mi ilin kondukis al la ĉambro. Certe, ĝi ne estis eleganta,

sed nur tian mi havis ; dolĉa cetere kiel forno, ĉar estis pordo, kiu komunikis kun la stalo, kaj la kristanoj profitis la varmon de la bestoj. Irante por preni pajlon por aranĝi la liton, mi lasis malfermata la pordon komunikigan, kaj Peĉjo, kiu ĉiam restis libera kiel la aero, ĉar ĝi estis milda kiel ŝafido, eniris post mi en la ĉambron, min sekvante kiel hundo, kaj manĝante ĉe la pajlogarbo, kiun mi havis sub la brako.

— « Vi havas tie vere belan beston, diris unu el la vojaĝantoj. »

Efektive, mi nescias, ĉu vi tion rimarkis, sed Peĉjo estas belega en sia bestospeco.

Mi kapjesigis.

— « Kiel ĝi nomiĝas ? daŭrigis la pli alta el ambaŭ.

— Ĝi nomiĝas Peĉjo. Ho, vi povas ĝin voki : ĝi ne estas fera ; tuj ĝi venos.

— Kaj kiom valoras tiu azeno ?

— Ba ! dudek guldenoj, tridek guldenoj.

— Estas ege malkare.

— Efektive, mi diris, rilate al la servoj, kiujn ĝi donas, estas malkare. Nu, Peĉjo ; mia amiko, necesas, ke ni lasu tiujn sinjorojn kuŝiĝi. »

Ĝi min sekvis, kvazaŭ ĝi min komprenus. Mi fermis la interpordon, kaj por ne plu ĝeni la sinjorojn, mi reeniris tra la antaŭpordo ; momenton poste, mi aŭdis ilin tutkore ridi.

— « Bone, mi diris, Dio rigardas la dometon, kies gastoj estas ĝojaj. »

Postan tagon, ĉirkaŭ la sepa, la du junuloj vekiĝis ; mia filo jam foriris por ĉasi. Bedaŭrata Francisko, estis lia emego. Fine, Marianino estis preparinta la matenmanĝon. Niaj gastoj

la dua. 1/1

i/a

manĝis kun apetito de vojaĝantoj ; poste ili volis pagi sian ŝuldon ; mi diris al ili, ke tio estas, kion ili volas ; ili donis ormoneron al Marianino, kiu volis ion repagi, sed ili rifuzis ; ili estis riĉaj verŝajne.

— « Nun, mia bravulo, diris unu el ili ; tio ne estas ĉio ; necesas, ke vi pruntedonu al ni Peĉjon ĝis Brunnen.

— Kun granda plezuro, miaj sinjoroj, mi respondis, vi ĝin lasos en la gastejo « Ĉe l'aglo », kaj unuan fojon kiam mi iros por aĉetaĵoj, mi ĝin reprenos. Peĉjo estas je via servico ; vi ĝin prenu ; vi ĝin rajdos ~~unu~~ post alia, eĉ ambaŭ samtempe ; ĝi estas fortika ; tio vin senlacigos.

— Sed, diris lia amiko, ĉar malfeliĉo povas okazi al Peĉjo...

— Kion do vi volas, ke okazu al ĝi ? la vojo estas bona de ĉi tie ĝis Ilak, kaj de Ilak al Brunnen, ĝi estas bonega.

— Fine, oni ne povas scii. Ni pagos al vi ĝian valoron.

— Neutile, mi konfidas vin.

— Mi ĝin ne prenos sen tiu kondiĉo.

— Agu kiel vi volos, Sinjoroj, vi estas la mastroj.

— Vi diris, ke Peĉjo valoras tridek guldenojn.

— Almenaŭ.

— Jen kvardek ; donu al ni kvitancon de la sumo. Se ni redonas vian beston en bona stato en la manojn de la hotelestro ĉe l'Aglo, li ĝin repagos ; se malfeliĉo trafas Peĉjon, vi ilin konservos. »

Oni ne povis pli taŭge paroli. Mia bofilino, kiu povas skribi kaj legi, ĉar ŝi estas la filino de la lernejestro de Goldaŭ, donis al ili kvitancon taŭgan ;

ne

servo
u

a/

oni surmetis la jungaĵon de Peĉjo kaj ili foriris. Oni devas konfesi la meritojn de la kompatinda besto ; ĝi ne volis marŝi ; ĝi min rigardis per malgaja mieno, tiel ke ĝi min ĉagrenigis kaj mi iris detranĉi panpecon por doni al ĝi. Ĝi tre ŝatas la panon, Peĉjo ; estis rimedo por farigi al ĝi ĉion, kion oni volas ; tiamaniere mi nur bezonis diri al ĝi : « Nu, iru. » por ke ĝi tuj ekiru. Je tiu epoko, ĝi estis tiel obee-
ma kiel hundeto.

— La maljuneco ĝin tre ŝanĝigis.

— La vero estas, ke ĝi ne estas rekonebla ; sed, kun via permeso, ne la aĝo, sed la aludita akcidento tion okazigis.

— ... Kiu okazis al ĝi dum la vojaĝo ?

— Ho, jes, Sinjoro, kaj grava, ĉu ne, mia bona Peĉjo ?

— Ni vidu la akcidenton.

— Vi neniam tion divenus, sciu. Vi devas imagi, ke niaj petolaj Parizanoj havis ideon, kaj tre strangan certe ; anstataŭ sin varmigi tempon post tempo, kiel ili estis farintaj antaŭan tagon, ili imagis al si sin varmigi tiun tagon laŭlonge la vojo ; kaj ili estis pensintaj pri Peĉjo por tio. Mi sciis poste kiel ĉio okazis ; min informis najbaro de Ried, kiu laboris en la arbaro, kaj ilin vidis agi. Ili metis unue sur ĝian pakajselon tavolon de malseka herbo ; poste, sur la herbon, tavolon de neĝo, denove tavolon de herbo, kaj sur ĉion, abiajn branĉaĵojn, kiel vi vidis ilin amasigitajn laŭlonge de la vojo. Tiam per sia fajrigilo ili ekbruligis la faskon ; tiamaniere ili nur bezonis sekvi Peĉjon por sin varmigi kaj etendi la manon por ekbruligi siajn cigarojn, tute kiel ili estus an-

igi ĝin fari
ĉion

10

taù sia kameno. Kion vi diras pri tiu elpensajo ?

— Mi diras, ke mi tie bonege rekonas miajn Parizanojn.

— Mi verŝajne ilin konis antaùe ; jam mi traktis kun ili dum la tempo de generalo Massena.

— Kiel ; vi jam loĝis en tiu lando ?

— Mi ĵus estis enloĝinta. Mi alvenis de la kantono de Vaùd ; jen kial mi parolas france.

— Kaj vi vidis la faman batalon apud Mùotta Thal ?

— Jes, mi ĝin vidis ; tio estas alia historio, jes, historio mia.

— Ha, vere ; kaj nun temas nur pri Peĉjo.

— Jes ja... Ĉio sukcesis tiel dum proksime unu mejlon; ili trairis la vilaĝon de Sonembuk, sin varmigante, kiel mi diris, kaj nur haltis por remeti lignon en la fajron. Ĉiuj vilaĝanoj eliris sur sia sojlo por ilin vidi trapasantajn ; tio neniam estis vidita, kompreneble. Sed iom post iom la neĝo, kiu malpermesis, ke Peĉjo sentu la varmon, fluidiĝis; la du tavoloj de herbo sekiĝis ; la fajro progresis, dum la Parizanoj nenion atentis, kaj ju pli ĝi progresis, despli ĝi proksimiĝis je la haùto de Peĉjo ; tial ĝi unua tion rimarkis. Ĝi komencis sulkigi la haùton, tiel, ke la junuloj ne povis ĝin sekvi ; poste bleko, poste troti, poste galopi kaj ju pli rapide ĝi iris, despli vigle la aerfluo bruligis la fajron. Fine, la kompatinda besto ŝajne freneziĝis ; ĝi sin rulis ; sed la fajro estis atinginta la selon kaj tio ĝin rostigis ; ĝi sin relevis, poste sin denove rulis. Fine, pli kaj pli ruliĝante, ĝi atingis la bordon de la rivero, kaj ĉar tiu estis tre dekliva, la azeno enfalis. La peto-

um

/n

al
?

2

luloj daŭrigis sian vojon, ne maltrankviligante pri ĝi ; ili estis ĝin pagintaj.

3 Du horojn poste, oni retrovis Peĉjon ; ĝi estis estingita ; sed, ĉar la bordoj de la Muotta estis krutaj, ĝi ne povis eliri kaj restis tutan tempon en la glaciita akvo, tiamaniere ke, unue rostiginte, ĝi nun frostigis. Oni volis ĝin proksimigi al la fajro, sed tuj kiam ĝi vidis la flamon, ĝi forkuris kiel frenezulo kaj, ĉar ĝi konis sian vojon, ĝi revenis hejmen, kie ĝi estis malsana dum ses semajnoj. De tiu tempo, ĝi ne plu povas toleri akvon nek fajron.

Tial ke mi estis vidinta malinklinojn pli eksterordinarajn ol tiu de Peĉjo, mi tre bone komprenis la ĝian, kaj ĝi reprenis en mia estimo la tutan ŝaton, kiun estis forprenintaj ĝiaj du petolaĵoj.

De Chamonix al Londono

Mi ĵus ekvekiĝis, kiam diskuto aŭdiĝis en la antaŭĉambro :

« Sinjoro ne estas hejme, diris Jozefo ;

— Ho, mi scias ja, respondis voĉo, kiu ne estis al mi nekonata, Oni diris al mi, ke en Parizo, oni neniam estas hejme ;

— Sinjoro eliris.

— Eliris ? je la oka ? Tio okazas en niaj montoj. Sed en la granda urbo, kiam oni estas for tiel frumatene, tio signifas, ke oni ne reeniris hieraŭ.

— Sinjoro neniam kuŝas eksterdome » diris seke Jozefo, kiu volas konservi al mi virgecan reputacion.

« Mi ne diras tion por vin ofendi ; sed tio ne malhelpas, ke, se li scius, ke mi estas ĉi-tie, li certe tuj min enirigus.

— Se vi volas lasi vian nomon ; daŭrigis Jozefo, mi ĝin montros al Sinjoro, kiam li revenos.

— Ho ! jes ja ! mi lasos mian nomon ; kaj kiam li scios, ke mi estas en Parizo, li sendos por min voki, kaj rapide certe.

— Kaj kie vi loĝas ! diris Jozefo, kiu ektimetis.

— Ĉe la barito de la Vilet' ĉar tie estas malplikoste ol en la urbo.

— Kaj kiel vi estas nomata ? aldonis Jozefo pli kaj pli malkvieta.

— Gabriel Pajo.

— Gabriel Pajo, el Ŝamuni ! (Chamonix), mi kriis el mia lito.

— Nu, ŝerculo, mi ja sciis, ke li estas hejme. Jes, el Ŝamuni.

— Eniru, mia brava, eniru.

— Ha ! diris Pajo.

Jozefo malfermis la pordon kaj anoncis sinjoron Pajo, el Ŝamuni. Pajo lin rigardis flanke, por vidi ĉu la kelnero lin ne mokas, sed vidante Jozefon fermi la pordon seriozamiene, li serĉis, kie mi estas, kaj min vidis en la lito.

— Ho ! pardonu, senkulpigu, li diris.

— Bone, bone, mia infano ; sed pro kiu okazaĵo.... ?

— Ho ! mi tuj rakontos ĉion al vi.

— Sidiĝu unue.

— Dankon, mi ne estas laca.

— Sidiĝu tamen, tia estas la kutimo en Parizo.

— Tial ke vi tion postulas...

— Nu, tie. »

Mi montris al li seĝon apud mia lito.

« Kaj kio vin alkondukas Parizon, mia bona Pajo ?

— Parizon ! Ba ! mi venas el Londono.

— El Londono ! Kaj kion, per la diablo, vi iris por fari en Londono ?

— Mi unue devas diri al vi ke, pasintan jaron, tuj post vi, Anglo venis al Ŝamuni. Ili venas multaj nun, vi sciu ; des pli bone por la vilaĝo, ĉar ili pagas malavare. Mi ne volas signifi, ke la Francoj ne pagas.... Ho ! ili pagas ankaŭ bone ; estas sama prezo por ĉiuj cetere. Sed ni preferas la Francojn, ĉar ili parolas Savoje. Do li

venis kaj faris saman ekskurson kiel vi, krom tio, ke li vizitis la « Gardenon », kien vi ne volis iri ; kaj vi malpravis ; ĉar, kiam oni tien iris, oni povas diri : mi tien iris. Do li diris al mi :

« Kiun lastan personon vi kondukis ? — Ha ! vere, bonan homon » Mi petas vian pardonon, Sinjoro, vi ne estis tie, mi diris kion mi opinias ; cetere vi scias, kiom ĉiuj vin amas ĉe mi. — Jen liaj atestoj. »

Vi memoras, ke vi donis al mi tri : unu en angla lingvo, unu en itala, unu en franca.

— Jes, certe.

— Sed, jen la ŝerco : vi tuj vidos ; do li diris al mi : « Se vi volas doni al mi unu el tiuj atestoj, por dudek frankoj, mi ĝin aĉetas. — Ĉu vi intencas fari ĝi gvidisto ? mi diris, estas malbona metio ; tion sciu, pli valoras esti mi-lordo. — Ne, li respondis, sed mi kolektas « ortografiojn ». Ho ! pri ortografio, ĝi estas bona, ĝi devenas de verkisto. »

Do, li tiris dudek frankojn el sia poŝo. Mi ilin prenas, kompreneble ; mi bone agis, ĉu ne ? Tiu paperĉifono ne pli valoris ?

— Tio ne valoris eĉ dudek soldojn.

— Tiel mi opiniis ; sed ili estas tiel strangaj, tiuj Angloj !

Do, kiam ni alvenis al la « Gardeno », antaŭ ni forkuras du ĉamoj ; estis hazardo ; sed tamen la Anglo estis tre kontenta.

— Per Dio ! li diris, jen bestetoj, kiujn mi volonte pagus mil frankojn po unu, se oni kondukus ilin en mian parkon.

— Oni povas samajn konduki por malplikare.

— Ĉu vere ? li diris.

pagus po
mil frankojn
por unu

— Je mia honoro.

— Jen mia adreso en Londono ; se vi kondukos al mi du vivantajn ĉamojn, mi ne rompos mian promeson.

— Akceptite, mi respondis.

— Ĉu vi deziras garantion ?

— Frapu en mian manon, tio sufi-
cas. »

Efektive, jen ĉio, kio estis dirita ; sed, forlasante min post tri tagoj, li donis al mi cent frankojn anstataŭ dudek sep.

Vi scias, ^{po}naŭ frankojn potage, tio estas la prezo por homo kaj mulo. Sed pri mulo, ĉu vi memoras Sektrotulon ? Ĝi estas ĉi tie.

— Ba ! mi kompatas vin, se vi venis ĝin rajdante.

a) — Ha ! mi ĝin ludonas al la vojaĝantoj, sed mi ĝin neniam surrajdas ; mi ĝin uzas nur ĉe la veturilo. Do, dum la printempo, mi memoris pri mia Anglo. Ĉar mi konas proksimume ĉiujn bestkaŝejojn, mi rapide sukcesis kapti du belegajn ĉamidojn, viron kaj inon ; ili estis dikaj kiel pugno, ili ne vidis la lumon, oni suĉigis ilin per suĉbotelo, kiel infanojn ; tio estas ofendi Dion verdire. Mia filino ilin nutris. Pri ŝi vi certe memoras. Ŝi estis graveda, ŝi naskis idon, oni min atendas por la bapto. Do kiam miaj ĉamoj havis tri monatojn, neperdinte la adreson de mia Anglo, mi diris al mia edzino : « Necesas, ke mi iru Londonon. »

Imagu, kiel ŝi ektimis.

— Kion vi volas fari en Londono ?

— Liveri mian komercaĵon ; tiuj du bestoj valoras dumil frankojn.

— Vi estas ebria, ŝi diris. »

Tio estas ŝia kutima vorto Mi lasas ŝin diri ; mi iras en la korton, mi aranĝas malnovan kaĝon, mi tiras la

Viro kun

igis ilin
suĉi

ĉareton el la remizo, mi eniras en la stalon kaj diras al Sektrotulo :

« Jen longa vojo farota. »

Mi metas la ĉamojn en la kaĝon, la kaĝon en la ĉareton, la ĉareton post Sektrotulon ; mi demandas la lernejestron pri la vojo al Londono. Li diras al mi, ke kiam mi estos en Salancê' mi nur bezonas turniĝi desktren ; kiam mi estos en Liono, turniĝi maldeks-tren, kaj ke, en Parizo, iu ajn portisto montros al mi mian direkton.

Efektive, en Parizo, oni diris al mi :
« Vi vidas la Sen (Seine).

Nu, sekvu ĝin ĉiam kaj vi alvenos en Le Havre.

— Kaj vi foriris tiel, sen alia interkonsento kun via Anglo ?

— Ĉio estis interkonsentita ; li estis frapinta en mian manon.

Sed jen la plej bela parto de mia rakonto : mi alvenas en Le Havre ; estis nigra nokto ; la gastejestro demandas min, kien mi iras ; mi respondas, ke mi iras Londonon. Postan tagon matene, mi ĵus jungis la mulon, kiam en la korton eniras junulo kun vaksita ĉapelo, blua vesto kaj blanka pantalono ; li min aliras, mi ĵus metis mian bluzon ; li diris :

— Ĉu estas vi, kiu iras Londonon ?

— Jes.

— Nu, ĉu vi volas, ke mi vin trapa- Frans
sigu ?

— Tra kio ?

— La Manĉ (La Manche). (1)

— Ŝerculo ! »

Mi bukligas la subventran rimenon de Sektrotulo, kaj antaŭen, ni ekmarŝu.

(1) En la franca teksto estas ludvorto netradukebla en Esperanton. La

— La vojo al Londono, mia amiko ?
— Tute rekte. »

La vaksĉapelulo min sekvis. Post kvin minutoj, neniu vojo plu.

Mi demandas, kie mi estas, oni respondas al mi :

— Sur la haveno.

— Kaj kie do Londono ?

— Nu, sur la alia flanko de la maro.

— Ĉu neniu ponto ?

La vaksĉapelulo ekridis.

« Ha ! mi diris, sed ni ne interkonsentis pri tio ; li ne diris al mi, ke estas maro, la Anglo. Mi ne estas maristo. »

Mi estis kolerigita, treege ; fine mi diris al Sektrotulo :

« Necesas returneniri, certe, tio ne estas nia afero.

Ni reiras ; la sentaŭga gastejestro staris ĉe sia sojlo.

« Nu, li diris, jen vi ?

— Jes, jen mi ; vi estas ĝentila, vi ne diris al mi, ke necesas traŭri maron por iri Londonon. »

Li ekridis.

« Petolulo !

Pripensu, li diris, mi vidis vin eliri kun maristo de l'vaporŝipo.

— La vaksĉapelulo ?

— Jes.

— Urbano vere afabla ankaŭ, kiel vi.

— Nu, envenu trinki glason da pomvino, diris la gastejestro.

franca esprimo : « Passer la Manche » signifas :

1) Trapasi la maron inter Francujo kaj Anglujo ;

2) Enmeti la brakon en la manikon de vesto.

Krans

Mi devas diri al vi, ke en tiu lando, oni faras vinon per pomoj.

— Jes, mi scias. Fine, kiel vi foriris ?

— Ho ! mi devis akcepti, kion ili volis. Mi lasis Sektrotulon kaj la ĉareton ĉe la gastejestro, kaj postan manenon frue, mi enŝipiĝis kun miaj bestoj. Ĉu vi volus kredi, ke ili havis aplombon pagigi al mi ilian lokon ? Kiam mi diras, ke mi pagis, ne mi, sed iu milordo pagis, ĉar miaj ĉamoj amuzigis lian filinon.

Mi alvenis Brajtonon kaj post du tagoj Londonon. Tuj alveninte, mi demandas, ĉu oni konas la adreson ; oni sciigas min pri la domo. ĉe la pordo, mi demandas, ĉu oni konas mian sinjoron ; oni diras, ke efektive, estas ĉitie. Mi eniras kun miaj bestoj ; ĉiuj domanoj estis ĉirkaŭ la ĉaro. Iu sinjoro aperas ĉe la fenestro kaj demandas kio okazas. Mi rekonas mian vojaĝinton.

« Estas Gabriel Pajo, el Ŝamuni, mi diras, kaj mi alkondukas al vi viajn ĉamojn.

— Ha !

— Vi scias, kion vi diris al mi ?

— Jes. »

Li estis min rekoninta. Estas kiel vi ; Ha ! jen brava milordo.

Estis vera ĝojo en la domo. Oni kondukas la ĉamojn en belegan ĉambron.

« Bone, mi diris, se oni ilin loĝigas tiel, kien oni min metos ? en palacon ? »

Mi ne estis erarinta. Granda lakeo diras al mi, ke mi lin sekvu ; mi surprenas du etaĝojn. Oni malfermas al mi ĉambregon, kie estis ĉie tapiŝoj, silkaj kurtenoj, veluraj seĝoj ; vera lukso !

Ja vere, mi ne hezitis ; mi lasis miajn ŝuojn ĉe la pordo kaj eniris kiel hejmen. Post kvin minutoj, la servisto alportis al mi pantoflojn kaj demandis, ĉu mi preferas manĝi kun milordo aŭ esti servita en mia ĉambro. Mi respondis, ke tio okazos, kiel milordo volos. Tiam li demandis min, ĉu mi kutimas min mem razi ; mi respondis, ke en Ŝamuni la lernejestro min razas dum siaj liberaj momentoj, sed ke, kiam mi vojaĝas, mi estas devigata mem tion fari.

« Jes, tio ja estas videbla, li diris. »

Efektive, mi havis du aŭ tri strekvundojn, ĉar mi havas pezan manon, pro la kutimo min apogi sur ferpintan bastonon, imagu.

« Oni sendos al vi la ĉambriston de milordo.

— Sendu. »

Kvin minutojn poste, eniris sinjoro kun blua vesto, blanka pantaloneto kaj silkaj ŝtrumpoj. Divenu, kiu li estis.

— La ĉambristo. »

Strange ! Nu, mi kredis, ke li estas estro. Mi leviĝis kaj lin salutis. Li diris, ke li venas por min razi ; mi ne volis lin kredi ; li tiris razilojn, sapujon, fine ĉion, kio estas necesa ; li donis brakseĝon, mi malfacile konsentis sidiĝi ; mi volis montri al li, ke mi konas bonan edukitecon. Mi diris al li :

« Ne, ne, mi staros, dankon.

Sed li respondis, ke tio lin ĝenos. Mi sidiĝis ; li frotis mian mentonon per sapo, kiu odoris moskon ; poste li pasigis la razilon sur la vizaĝon ; tio ne estis razilo, tio estis veluro ; poste li diris :

« Farite.

Mi ne estis ĝin sentinta.

« Nu, ĉu sinjoro volas, ke mi lin vestu ? »

— Dankon, mi kutimas vestiĝi mem.

— Ĉu sinjoro deziras tolaĵon ?

— Ho ! mi havas ĉion necesan en mia pako ; ĉu vi opinias ke mi ĉi tien venis kiel senpantalonulo ? Alportigu al mi mian vestujon ; ĝi estas garnita, sciu.

— Kaj kiam sinjoro estos preta ?

— Post dek minutoj.

— Sed milordo atendas sinjoron por matenmanĝi.

— Se li bezonas rapidi, diru al li, ke li komencu, mi lin reatingos.

— Milordo atentos Sinjoron.

— Do, ni rapidu. »

Mi zorgis pri taŭga tualeto, kiel eble plej bone. Milordo estis en la manĝoĉambro kun sia edzino kaj du beletaj infanetoj. Li min prezentis al ŝi kaj diris al ŝi kelkajn vortojn angle.

« Senkulpigu, li diris, sed Miladi ne parolas france. »

Stranga baptonomo, Miladi, ĉu ne ?

« Nenio grava, mi diris, oni ne estas senhonorigita pro tio. »

Sinjorino Miladi signis, ke mi devas sidiĝi apud ŝi. Milordo verŝis al mi por trinki, mi salutis la ĉeestantojn kaj levis la glason al mia buŝo.

« Jen bonega vino, mi diris al milordo.

— Jes, ĝi ne estas tro malbona.

— Kaj tiu ŝercema Vaksĉapelulo, kiu diris al mi, ke la vino kostas dek-du frankojn ^{po} botelo en Anglujo.

— Jes, la ordinara bordovino ; sed tiu-ĉi estas Ŝato-Margo. (Château-Margaux).

— Kiel ? ju pli bona ĝi estas, des pli malmulte ĝi kostas ? stranga lando !

miladi

— Vi ne komprenis min ; mi diras ke, laŭ mia opinio, tiu-ĉi kostas unu luidoron. »

Mi prenis la botelon, por enverŝi tion, kio restis en mia glaso.

« Kion vi faras, diris milordo, haltigante mian brakon ?

— Mi ne trinkas vinon po luidoro ; estas ofendi Dion. Gardu ĝin por kiam la reĝo venos manĝi ĉe vi, bone.

— Ĉu vi ne trovas ĝin bona ?

— Mi estus tre petema.

— Nu, tiam ne hezitu, mia brava, mi donos al vi dudekon da boteloj por via vojaĝo. »

Dum mi devis nur trinki vinon kaj manĝi bisteojn, ĉio sukcesis ; sed je la fino de l'matenmanĝo, jen alta longkreskulo, kiu alportas pleton kun taso, arĝentan kafkruĉon kaj bronzan fontanon en kiu estis akvo kaj fajro. Oni metas ĉion antaŭ la dommastri-
non ; ŝi ĵetas plenmanon da vundsanigilo en la kafkruĉon ; ŝi turnas la kranon ; la akvo fluas ; post kvin minutoj oni verŝas la infuzajon en la tasojn.

Milordo prenas unu, Miladi alian ; oni donas al mi la trian, mi diras :

Ne, dankon, mi ne vundis mian kapon, mi ne timas absceson, vi trinku vian sanigilon, sed mi min detenas.

— Tio ne estas por la kapvundoj, diris milordo, tio estas por la digestado de la stomako. »

Mi timas dufoje rifuzi, mi prenas la tason. Mi sorbas tri glutojn, ne gustumante ; je la kvara, neeble, estis malbonege ; mi remetis la tason.

— Nu, diris Milordo ?

— Nu ! Nu !

— Estas bonega teo, kiu venas rekte el Ĉinujo.

— Ĉu Ĉinujo estas tre malproksime ?

— Vere je kvin mil francaj mejloj for de Londono proksimume.

— Nu, mi ne iros por serĉi teon tie, se ĝi mankas ĉi tie. »

Sinjorino Miladi flustris du vortojn angle. Tiam milordo sin turnis al mi kaj diris :

— Ĉu vi ne metis sukeron en vian tason ?

— Ne, mi respondis, tion mi ne sciis.

— Sed tio certe estas malbonega.

— Vere tio ne estas bona ; plie vi ne diris, ke mi devas atenti, kaj mi bruligis mian langon, vidu !

— Kompadindulo !

— Kaj tio ne estas ĉio ; Ho ! Ho ! Ŝajnas al mi, ke la marmalsano min denove kaptas. Estas la varma akvo, sciu, mi ne povas toleri la varman akvon ; eĉ la malvarma min dolorigas.

— Kion vi volas trinki, Pajo ? necesas ion trinki.

— Ĉu vi permesas, ke mi min kuraĉu mem ?

— Sendube.

— Nu ! donigu al mi glason da brando, da maljuna brando. »

« Jen mi memoras, mi diris al Pajo, tre kontenta trovi okazon interrompi lian rakonton, kiu komencis longiĝi, mi memoras, ke vi ne malŝatas konjakon... Jozefo ! »

Mia servisto eniris.

« Alportu la boteletaron.

— Ho ! ne necesas tuta botelaro, unu botelo sufiĉos.

— Estu trankvila ! Do vi estas bone akceptita en Londono ? Kiom da tagoj vi tie restis ?

— Tri tagojn ; la unuan, milordo

kondukis min en la kamparon. Ni el-lasis la ĉamojn en la parkon antaŭ la edzino kaj la infanoj ; tio estis vera festo. Duan tagon, ni iris teatron, ĉiam en la veturilo de milordo. La trian, li kondukis min ĉe vestvendiston, kie estis pli ol cent kvindek vestoj finfaritaj, kaj li diris al mi : « Elektu kompletan. »

Tiam mi ne hezitis kompreneble ; mi elektis veluron, kiu staris rekte ; mi ĝin provis ; ĝi taŭgis kiel ganto ; cetere jen ĝi estas, vidu. »

Pajo leviĝis, turniĝis dufoje.

« Nun, diris al mi milordo, necesas, ke oni enmetu ion en la poŝojn, por ke ili ne svingiĝu, jen cent gineoj.

— Kion valoras cent gineoj ?

— Proksimume dumil sep cent frankojn.

— Sed vi ŝuldas al mi nur dumil frankojn.

— Por la ĉamoj, jes ja, la sep cent frankoj estas por la vojaĝo.

— Fine, mi diris, mi ne scias, kiel vin danki.

— Tio ne estas dankinda ; nun, tiom kiom vi volos resti, estos por mi plezuro.

— Dankon, sed pripensu ; mi devas reiri hejmen. Mia filino naskis idon, oni min atendas por la bapto. Ha ! sentio, mi ja restus ĉi tie, mi estas tre bone.

— Tiam mi rekondukos vin morgaŭ al Brajton, la vaporŝipo foriros postmorgaŭ al le Havre ; mi luigos vian lokon.

— Nu milordo, mi preferus uzi alian vojon kaj pagi la veturilon.

— Neeble, mia amiko. Anglujo estas insulo, kiel la « Ĝardeno », kien ni

iris, ĉu vi memoras ? Nur, anstataŭ
glacio, akvo estas cirkaŭe.

—Do, ĉar tiel estas kaj ke ni ne
povas tion ŝanĝi, ni ne devas malĝo-
iĝegi, mi foriros morgaŭ. »

Postan tagon, kiam mi estis ĵus su-
prenironta en la veturilon, sinjorino
Miladi donis al mi kesteton.

« Estas donaco por via filino, diris
al mi milordo.

— Ho ! Sinjorino Miladi, mi diris,
vi estas tre bona.

— Vi povas nomi mian edzinon Mi-
ladi, tute simple.

— Ho ! neniam.

— Mi permesas al vi. »

Mi do ne povis rifuzi, mi diris al ŝi :

— Adiaŭ ! Miladi » kiel mi estus di-
ranta « Adiaŭ ! Karlino. »

Kaj jen mi.

« Estu bonvena, Pajo. »

La BIFTEKO de URSO

Mi alvenis ĉe l'hotelo de Poŝto en Martigny ĉirkaŭ la kvara vespere.

« Sciu, mi diris al la hotelestro », dum mi metis mian ferpintan bastonon en la kamenangulon, kaj fiksante mian ĉapelon ĉe l'ekstremaĵo de la bastono, « estas laĉiga vojo de Bex ĝis ĉi tie. »

— Jes, kaj estas dudek francaj mejloj,, proksimume de ĉi tie ĝis Samuni. ?

— Naŭ mejloj.

— Dankon. Havigu gvidiston morgaŭ je la sesa matene.

— Ĉu Sinjoro piediras ?

— Ĉiam »

Kaj mi vidis, ke se miaj kruroj gajnas iom da konsidero en la menso de mia gastiganto, tio estas certe je l'domaĝo de mia situacio.

« Sinjoro estas artista, li daŭrigis ?

— Proksimume.

— Ĉu Sinjoro tagmanĝas ?

— Ĉiutage kaj religie. »

Efektive, ĉar la manĝado estas sufiĉe multekosta en Svisujo, kaj ĉiu tagmanĝo kostas kvar frankojn, antaŭfiksita prezo, kiun oni tute ne povas malpliigi, de longatempe, pro ŝparmaj projektoj, mi estis provinta iom gajni pri tio. Fine, post longaj pripensoj, mi sukcesis trovi rimedon mezan

inter la skrupula malcedemo de l'hotelestroj kaj la krio de mia konscienco.

Ĝi konsistis el tio, ke mi nur forlasis la tablon, kiam mi estis manginta por proksimuma valoro de ses frankoj ; tiamaniere mia tagmanĝo kostis al mi nur du frankojn. Tamen, min vidante tiel laborema ĉe la tablo, kaj aŭdante min diri : « Kelnero, dua servico, « la hotelestro murmuris inter siaj dentoj : »

« Jen Anglo, kiu tre bele parolas francan lingvon. »

Vi vidas, ke la gastejestro de Martigny ne estas naturdotita de la fiziognomika scienco de sia sampatrujano Lavater, ĉar li maltimis fari al mi tiun demandon almenaŭ maldecan :

« Ĉu Sinjoro tagmanĝas ? »

Kiam li aŭdis mian jesan respondon, li daŭrigis ;

« Sinjoro havas bonŝancon hodiaŭ ; ni havas ankoraŭ ursajon.

— Ha ! Ha ! mi diris, ne tre bone flatita pri la rostaĵo, ĉu ĝi estas bona, via ursaĵo ? »

La hotelestro ridetis, skuante la kapon supren kaj malsupren, per movo, kiu povis esti tradukata tiel :

« Kiam vi estos manginta tion, vi ne plu volos manĝi alian aferon.

— Tre bone, mi daŭrigis, kaj je kio-
ma horo la manĝado ?

— Je la duono de la sepa. »

Mi eltiris mian poŝhorloĝon ; estis nur dek minutoj post la kvara.

« Bone, mi diris aparte, mi havos tempon por viziti la malnovan kastelon.

— Ĉu Sinjoro deziras iun por lin konduki kaj klarigi de kiu epoko ĝi da-

3
Servico

2

tumas ? » diris la hotelestro, respondante al mia flankparolo.

« Dankon, mi trovos mem la vojon. Pri la epoko, je kiu datumas via kastelo, estis Petro de Savojo, alnomita la Granda, kiu, se mi ne eraras, ĝin konstruigis ĉirkaŭ la fino de l'dekdua jarcento.

— Sinjoro scias nian historion tiel bone kiel ni. »

— Mi lin dankis pri lia intenco, ĉar videble li volis tiel min gratuli.

« Ho ! li aldonis, nia lando, estis fama iam ; ĝi havis latinan nomon, ĝi ofte suferis gravajn militojn kaj ĝi estis restadejo de iu roma imperiestro.

— Jes, mi respondis lasante elfaŝi senzorge la sciencon el miaj lipoj ; jes, Martigny estas la Oktodurum de la Keltoj kaj ĝiaj nunaj loĝantoj estas la posteuloj de la Veregrianoj, pri kiuj skribis Cezaro, Plinius, Strabo, kaj Titus Livius, kiuj ilin nomas eĉ Duon-Germanoj. Kvindek jarojn proksimume antaŭ Kristo, Sergius Kalba, leŭtenanto de Cezaro, estis tie sieĝata de la Sedunoj ; la imperiestro Maksimiliano volis, ke lia armeo sanktoferu al la falsaj dioj, kaj tio okazigis la martirigon de sankta Maŭricius kaj de la tuta Tebea legiono ; fine, Petronius, prefekto de l'tribunalo estis komisiita dividi la Galiojn en deksep provincoj, li apartigis la Valezon el Italio, kaj faris vian urbon ĉefurbo de la Peninaj Alpoj, kiuj poste formis kun la Tarentezo la sepan Vienan provincon. Ĉu tio ne estas ĝusta, mia gastiganto ? »

Li estis ŝtonigita pro admiro. Mi vidis, ke mi bone efikis. Mi iris al la pordo, li sin metis ĉe la muro kun la ĉapelo en la mano, kaj mi fiere pasis

antaŭ li, kantetante tiel malĝuste kie eble :

« Venu, ĝentila virin' »

« Venu, mi atendas vin. »

Mi ne estis malsuprenirinta dek ŝtupojn, kiam mi aŭdis la viron krei laŭtege al la kelnero :

« Pretigu por Monsinjoro la numeron trian. »

Estis la ĉambro kie dormis Maria Luiza, kiam ŝi trapasis en Martigny en 1829.

Tiel mia pedanteco estis doninta la frukton de mi esperitan. Ĝi estis haviginta al mi la plej bonan liton ^{el} la gastejo ; de kiam mi estis forlasinta Genevon, la litoj min malĝojegigis.

Mi devas diri, ke la svisaj litoj entenas nur kaj simple pajlaĵon kaj risortan submatracon, sur kiun oni etendas, nomante ĝin littuko, specon de tablotuko tiel mallonga, ke oni ne povas ĝin refaldi ĉe la malsupra parto sub la matracon, nek ruligi ĉe la supra parto sub la kapkusenon, tiamaniere ke, la piedoj kaj la kapo povas ĝin utiligi unu post la alia, vere, sed neniam ambaŭ samtempe. Aldonu al tio, ke ĉiuflanke la harego eliras rigida kaj premita tra la tolaĵo kaj tio okazigas sur la haŭto de la vojaĝanto proksimume saman efikon, kvazaŭ li kuŝiĝus sur granda kapbroso.

Do, lulita de espero je bona nokto, mi faris en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo promenadon dum unu horo kaj duono, sufiĉa tempo por vidi ĉion rimarkindan en la iama ĉefurbo de Peninaj Alpoj.

Kiam mi reeniris, la vojaĝantoj sidis ĉe la tablo. Mi sendis ekrigardon rapidan kaj malkvietan sur la gastojn: ĉiuj seĝoj sin tuŝis, ĉiuj estis okupataj, ne estis loko por mi.

di
(pezo)

Tremeto trakuris mian korpon; mi rigardis returne por serĉi mian gastiganton. Li estis mallantaŭ mi. Lia vizaĝo ŝajnis al mi mefistofela; li ridetis.

« Kaj mi, mi diris, kaj mi, malfeliĉulo? »

— Jen « li diris, montrante al mi per la fingro apartan tableton, jen via loko, homo tia kia vi estas, ne devas manĝi kun tiaj homoj. »

Ho! la bona Oktoduro! Kaj mi estis lin suspektinta! Vere, ĝi estis mirinde bele kovrita, mia malgranda tablo. Kvar manĝaĵoj formis la unuan servicon kaj en la mezo estis bifteko, kies mieno hontigus anglan biftekon. Mia gastiganto vidis, ke tiu bifteko kaptas mian atenton. Li sin mistere klinis al mia orelo:

« Ne estos sama por ĉiuj, li diris.

— Kio do estas tiu bifteko? »

— Lumbaĵo de urso, nur tio. »

Mi estus preferinta, ke ili lasus min kredi lumbaĵon de bovo.

Mi rigardis senkonscience tiun manĝaĵon tiel laŭdatan, kiu rememorigis al mi tiujn malfeliĉajn bestojn, kiujn mi etulo vidis grumblantajn kaj kotplenajn, kun ĉeno en la nazo kaj homo ĉe la fino de la ĉeno, kaj kiuj dancis peze, rajdante bastonon kiel la infano de Virgilius; mi aŭdis la sensoran bruon de l'tamburo sur kiun la homo batis, la akran sonon de la fluteto en kiun li fajfis; kaj tio ĉi ne donis al mi, por la tiel laŭdata karno, kiu estis antaŭ miaj okuloj, simpation tre manĝigeman? Mi prenis la biftekon, kaj mi sentis, pro la facileco enirigi en ĝin mian forketon ke ĝi almenaŭ havis tiun econ, kiu faris la ŝafojn de fraŭlino Scuderi tiel malfeliĉaj. Tamen mi ankoraŭ hezitis, ĝin turnigante kaj re-

servon

son

viro

viro

8

turnigante sur ambaŭ flankoj rostitaj, kiam mia gastiganto, kiu min rigardis, ne komprenante mian heziton, min decidigis per jenaj vortoj :

« Gustumu tion, kaj vidonos al mi vian opinion pri ĝi. »

Efektive, mi detranĉis peceton dikan kiel olivo, mi saturigis ĝin per tiom da butero, kiom ĝi povis sorbi, kaj malfermante miajn lipojn, mi ĝin portis al la dentoj, pli ĝuste pro malbona honto ol en la espero venki mian malŝaton. Mia gastiganto, starante malantaŭ mi, sekvis miajn movojn kun bonanima senpacieneco de homo, kiu jam feliĉe ĝuas la surprizon tuj sentotan. La mia estis granda, mi konfesas. Tamen mi ne maltimis tuj montri mian opinion ; mi timis, ke mi eraris ; mi retranĉis silente duan peceton, duoblan proksimume de la unua; mi sekvigis al ĝi la saman vojon kun samaj antaŭzorgoj, kaj kiam ĝi estis sorbita :

« Kiel ! Estas ursajo ? mi diris.

— Ursajo.

— Ĉu vere ?

— Vorto de honoro.

— Nu, tio estas bonega. »

Je la nuna momento, oni alvokis al la granda tablo mian gastiganton, kiu, trankviligita de la certeco, ke mi apetege manĝas lian preferatan manĝaĵon, min lasis duope kun mia bifteko. La tri kvaronoj jam malaperis, kiam li revenis, kaj reprenante la interparoladon je la punkto, kie li ĝin interrompis :

« La besto, li diris, kun kiu vi interrilatas, estis ja neordinara besto. »

Mi kapjesigis.

« Ĝi pezis tri cent dudek.

— Bela pezo. »

Mi ne interrompis la ~~dentagon~~.

u

(pezo)

« Kiun oni ne kaptis facile.

— Tion mi ja kredas. »

Mi portis la lastan pecon al mia buŝo.

« Tiu viglulo manĝegis la duonon de la ĉasisto, kiu lin mortigis. »

La viandpeco eliris el mia buŝo, kvazaŭ elpuŝita de risorto.

« La diablo vin forprenu ! » mi diris, turniĝante al li « ke vi faris tian petolaĵon al homo, kiu tagmanĝas.

— Mi ne petolas, sinjoro, tio estas vera, kiel mi diras al vi. »

Mi sentis mian stomakon sin retur-ni.

« Li estis, daŭrigis mia gastiganto, malriĉa landano de la vilaĝo de Fuli, nomata Vilhelmo Mona. La urso, kies nur peceto restas sur via telero, venis ĉiunokte ŝteli liajn pirojn, ĉar por tiuj bestoj, ĉio estas bona. Tamen ĝi sin turnis prefere al pirarbo ŝargita de « krasanoj » (speco de bonegaj piroj). Kiu povus imagi, ke tia besto havas saman guston kian homoj, kaj ke ĝi elektas en fruktĝardeno la dolĉegajn pirojn ? Sed la landano de Fuli, mal-feliĉe, ankoraŭ pli ŝatis la krasanojn ol ĉiujn aliajn fruktojn. Li unue kredis, ke infanoj venis rabi en lia ĝardeno ; li do prenis sian pafilon, ĝin ŝargis per dika kuireja salo kaj embuske atendis. Ĉirkaŭ la deknua, nokte, blekado aŭdiĝis en la monto. « Jen, li diris, estas urso en la ĉirkaŭaĵo ». Dek minutojn poste, dua blekado aŭdiĝis, sed tiel laŭte kaj proksime de Vilhelmo, ke li opiniis, ke li ne havos tempon por reatingi sian domon. Li sin ternis teren, havante nur la esperon, ke la urso venas ne por li sed por liaj piroj. Efektive, la besto aperis preskaŭ tuj je la angulo de la ĝardeno kaj

rekte iris al la dirita pirarbo, pasis je dek paŝoj de Vilhelmo, malpeze surpriris la arbon, kies branĉoj krakis sub la pezo de lia korpo, kaj tiel ekmanĝegis, ke estis memvideble, ke du tiaj vizitoj igus la trian senutila. Kiam ĝi satiĝis, la urso malrapide malsupreniris, kvazaŭ ĝi bedaŭris lasi kelkajn ; denove pasis apud la ĉasisto, kies pafilo per salo ŝargita ne povis en tiu okazajo multe utili, kaj foriris trankvile al la monto. Tio ĉi daŭris unu horon proksimume, dum kiu la tempo ŝajnis pli longa al la homo ol al la urso. Tamen la homo estis bravulo, kaj li estis mallaŭte dirinta, vidante la urson foriri :

« Bone, Foriru ! Sed tio ne restos tiel ; ni nin revidos. »

Postan tagon, unu el liaj najbaroj, kiu lin vizitis, lin vidis segi en pecetoj la dentojn de forkego.

« Kion do vi faras tiel ? »

— Mi amuziĝas. »

La najbaro prenis la ferpecetojn, lin turnigis kaj returnigis en sia mano, kiel homo lerta, kaj iom pripensinte :

« Nu, Vilhelmo, li diris, se vi volas esti nekaŝema, vi konfesos, ke tiuj ferpecoj estas destinataj por trabori haŭton pli malmolan ol tiu de ĉamo.

— Eble, respondis Vilhelmo.

— Vi scias, ke mi estas bona homo, respondis la najbaro Francisko ; nu, se vi volas, la urso estos por ni ambaŭ ; du homoj pli valoras ol unu.

— Tio ne estas tiel certa, » diris Vilhelmo ; kaj li daŭrigis segi sian trian ferpecon.

— Nu, daŭrigis Francisko, mi lasos al vi sola la haŭton, kaj ni duigos nur la monpremion kaj la karnon.

el
Viro
Viro

?

— Mi preferas ĉiom, diris Vilhelmo.

— Sed vi ne povas malhelpi, ke mi serĉu la postsignojn de l'urso en la monto, kaj se mi ilin trovos, ke mi embuske ĝin atendu.

— Vi estas libera. »

Kaj Vilhelmo, kiu finis la segadon de la tri ferpecoj, komencis siblante mezuri ŝarĝon de pulvo duoblan je tiu, kiun oni metas ordinare en pafilon.

« Ŝajnas, ke vi prenas vian provizajpafilon ? diris Francisko.

— Jes ja, tri ferpecoj estas pli taŭgaj ol plumba kuglo.

— Tio difektas la haŭton.

— Tio mortpafas pli certe.

— Kaj kiam vi esperas ĉasi ?

— Mi diros al vi tion morgaŭ.

— Lastan fojon, vi ne volas akcepti ?

— Ne.

— Mi informas vin, ke mi tuj serĉos la postsignojn.

— Bonan plezuron.

— Duope, ĉu ne ?

— Ĉiu por si men.

— Adiaŭ Vilhelmo.

— Bonan ŝancon, najbaro. »

Kaj la najbaro, forirante, vidis Vilhelmon meti duoblan ŝarĝon en la pafilon, poste la tri ferpecojn kaj loki la armilon en angulon de la butikoj. Vespere, denove, pasante antaŭ la domo, li vidis sur la benko ĉe la pordo Vilhelmon sidantan kaj trankvile fumantan sian pipon. Li aliris lin denove :

« Nu, mi ne sentas malpardonon. Mi trovis la postsignojn de la besto ; mi do ne plu vin bezonas. Tamen mi denove proponas al vi agi duope.

— Ĉiu por si mem, » diris Vilhelmo. »

« La najbaro tion rakontis al mi

antaŭhieraŭ », daŭrigis mia gastiganto, kaj li diris :

« Ĉu vi povas imagi, kapitano (ĉar mi estas kapitano en la milico, ĉu vi povas imagi la kompatindan Vilhelmon ? Mi lin vidas ankoraŭ sur lia henko, antaŭ la domo, kun liaj krucigitaj brakoj, fumante la pipon, kiel mi vin vidas... Kaj kiam mi pensas nun !

— Kaj poste ? » mi diris, vigle interesiĝante je tiu rakonto, kiu ekvekiĝis miajn simpatiojn de ĉasisto.

« Poste, daŭrigis mia gastiganto, la najbaro ne povis diri, kion faris Vilhelmo vespere. Je la duono de la dekunua, lia edzino vidis lin preni la pafilon, ruligi sakon el griza tolo sub la brakon kaj foriri. Ŝi timis demandi lin, kien li iras, ĉar Vilhelmo ne kutimis antaŭ informi pri io virinon.

Francisko, siaflanke, vere estis trovinta la postsignojn de la urso ; li estis ĝin sekvinta ĝis kiam ĝi eniris en la ĝardenon de Vilhelmo ; sed, ne rajtante embuskiĝi sur la tero de sia najbaro, li lokiĝis inter la abia arbaro, kiu estas mezalte de la monteto kaj la ĝardeno de Vilhelmo. Sed ĉar la nokto estis sufiĉe hela, li vidis lin eniri tra malantaŭa pordo. Vilhelmo iris ĝis la piedo de mezgriza roko, kiu estis derulinta de la monto ĝis la mezo de lia bieno kaj kiu staris apenaŭ je dudek paŝoj de la pirarbo. Li haltis tie, rigardis ĉirkaŭen por vidi, ĉu neniu lin spionas, malruligis la sakon, eniris en ĝin, nur ellasante tra la malfermaĵo la kapon kaj la du brakojn, kaj sin apogante ĉe la roko, li kuniĝis tiel kun la ŝtono per la koloro de lia sako kaj la senmoveco de lia persono, ke la najbaro, kiu sciis, ke li estas tie, ne povis lin distingi. Kvarono da horo tiel pa-

sis en la atendo de la urso. Fine, blekado, ĝin anoncis ; kvin minutoj poste Francisko ĝin ekvidis.

Tamen, ĉu pro ruzo, ĉu tial, ke ĝi subflaris la duan ĉasiston, ĝi ne sekvis sian ordinaran vojon ; male, ĝi ĉirkaŭiris kaj, anstataŭ alveni ĉe la maldekstro de Vilhelmo kiel ĝi faris hieraŭ, ĝi pasis je lia dekstro, for de la trafopovo de la armilo de Francisko, sed ne pli ol dek paŝoj de la pafilo de Vilhelmo.

Vilhelmo ne moviĝis. Oni povus kredi, ke li eĉ ne vidas la beston, kiun li venis atendi, kaj kiu ŝajnis lin spiti, pasante tiel proksime de li. La urso, kiu havis kontraŭan venton, ŝajnis siaflanke nescii la ĉeeston de malamikoj kaj daŭrigis malpeze sian vojon al la arbo. Sed en la momento kiam, sin levante sur la malantaŭaj piedoj, ĝi ĉirkaŭbrakis la trunkon per la antaŭaj piedoj, montrante nekovritan bruston, kiun liaj dikaj ŝultroj ne plu protektis, rapida lumstreko ekbrillis ĉe la roko kaj la tuta valo resonis de la pafado de l'armilo duoble ŝargita kaj de la blekado ellasita de la besto morte vundita.

Eble en la tuta vilaĝo ne estis unu persono, kiu ne aŭdis la pafon de Vilhelmo kaj la blekadon de la urso.

La urso forkuris, pasante je dek paŝoj de Vilhelmo, kiu ne estis vidita, ĉar li reenirigis la kapon kaj la brakojn en la sakon kaj denove miksiĝis kun la roko.

Tiun scenon rigardis la najbaro, apogite sur siaj genuoj kaj sia maldekstra mano, premante sian pafilon per la dekstra, pala kaj haltigante la spiron. Tamen li estas kuraĝa ĉasisto.

Nu, li konfesis al mi ke, en tiu mo-

mento, li estus preferinta esti en sia lito ol ĉe l'embusko.

Estis pli grave kiam li vidis la vunditan urson, post ĉirkaŭiro, sekvi la vojon hieraŭan, kiu ĝin kondukis al li. Li krucsignis, ĉar niaj ĉasistoj estas piaj, rekomendis sian animon al Dio, kaj certigis, ke lia pafilo estas ŝargita. ref

La urso estis nur je kvindek paŝoj je li, blekante pro doloro, haltante por sin ruli kaj mordi sian flankon je la loko de la vundo kaj reprenante la forkuron.

Li ĉiam proksimiĝis. Li estis nur je tridek paŝoj. Ankoraŭ du sekundoj ĝi venis tuŝi la tubon de la pafilo, kiam subite ĝi haltis, ensorbis brue la venton, kiu venis de la vilaĝo, eligis teruran blekon kaj reeniris la ĝardenon.

« Gardu vin, Vilhelmo, gardu vin, » kriis Francisko kurante post la urso kaj forgesante ĉion, por nur pensi pri la amiko, ĉar li ja vidis, ke, se Vilhelmo ne havis tempon por reŝargi la pafilon, li estas perdita ; la urso estis lin flarinta. ref

Apenaŭ li faris dek paŝojn, kiam li aŭdis krion. Tio estis homa krio, krio de teruro kaj de agonio samtempe ; krio en kiu, tiu kiu ĝin ellasas, estis kuniginta ĉiujn fortojn de sia brusto, ĉiujn preĝojn al Dio, ĉiujn helpopetojn al la homoj.

« Al mi ! »

Poste, plu nenio, eĉ ne plendo sekvis la krion de Vilhelmo. Francisko ne plu kuris, li flugis, la deklivo de la tero plirapidigis lian kuron ; pli kaj pli li proksimiĝis, li pli bone vidis la monstran beston, kiu moviĝis en la ombro, piedpremante la korpon de Vilhelmo kaj ĝin dispecigante.

Francisko estis je kvar paŝoj de ili ; la urso estis tiel obstinega sur sia viktimo, ke ĝi ne ŝajnis lin vidi. Li hezitis pafi, timante mortigi Vilhelmon, se tiu ĉi ne jam estas mortinta ; li tiel tremis, ke li ne estis certa pri taŭga pafado. Li prenis ŝtonon kaj ĝin ĵetis al la urso.

La besto sin returnis kolerega kontraŭ sian novan atakanton ; ili estis tiel proksimaj unu je la alia, ke la urso stariĝis por lin sufokigi. Francisko ĝin sentis apogi la bruston sur la tubon de la pafilo. Automate, li apogis la fingron sur la risorton ; la pafado eksplodis. La urso falis renverse ; la kuglo estis traborinta ĝian bruston kaj rompinta la vertebrojn.

Francisko ĝin lasis sin treni, blekegante, sur siaj antaŭaj piedoj, kaj kuris al Vilhelmo. Tio ne plu estis homo ; eĉ ne plu kadavro. Estis ostoj kaj pistita karno, la kapo estis preskaŭ tute manĝita.

Tiam, vidante per la movo de la lumoj tra la fenestroj, ke pluraj vilaĝanoj vekigis, li plurfoje vokis, signante la lokon, kie li estas. Kelkaj vilaĝanoj alkuris kun armiloj, ĉar ili aŭdis la kriojn kaj pafadojn. Baldaŭ la tuta vilaĝo kuniĝis en la ĝardenon de Vilhelmo.

Lia edzino venis kun la aliaj. Estis teruriga sceno. Ĉiuj ĉeestantoj ploris kiel infanoj. Oni organizis por ŝi, en la tuta vallo de Rhono kolekton, kiu donis sep cent frankojn. Francisko lasis al ŝi sian monpremion, vendigis je ŝia profito la haŭton kaj la karnon de la urso. Fine ĉiu klopodis por ŝin helpi.


Ĉiuj gastejestroj eĉ konsentis malfermi liston de mondonacoj ; kaj se


sinjoro bonvolas enskribi sian nomon...


« Tre certe ; donu rapide ».

Mi ĵus estis skribinta mian nomon kaj doninta mian oferon, kiam dika blondulo, mezalta, eniris. Li estis la gvidisto, kiu min kondukos morgaŭ al Samuni, kaj kiu demandis la horon de l'foriro kaj la vojaĝmanieron. Mia respondo estis tiel mallonga kiel preciza :

« Je la kvina matene, kaj piede. »







ENHAVO

La timema azeno.....	1
De Chamonix al Londono.....	12
La ^S bifteko de urso _A	25